

Boulogne sur Mer
31, Boulevard Mariette

la 29^{an} de Okt. 1923
17h30

Kara retrovita Korespondanto,

Kun granda ĝojo mi revidis vian manskribaĵon. Kiam oni kredas perdi ion + neniam plu revidi ĝin la plezuro ĝin trovi estas des pli granda.

Mi tute ne estas severa, ne diru tion. Mi tre bone komprenas viajn ĉiuj tagajn okupaĵojn + mi ne estas severa. Mi nur ĉagreniĝas iomete kiam kara kutimo iĝas pli + pli malofta + povas esti aldonata al la grandega nombro de seniluzioj kiujn oni spertas tra la vivo.

Sed mi ... tre bone komprenas + mi tute scias ke iam ... espereble, en la plej malproksima estonteco, vi ĉesos korespondi kun mi. Ĉiuj aliaj ankaŭ, sendube!!! Dum la maljuneco la luma fajereto kiu instigas nin en ĉiuj miaj agoj, iom post iom, estingiĝas + nur restas dolĉaj memoroj kiuj sendube sufiĉas Atendante tiun momenton, vivu, vivu profunde + profitu de ĉiuj belecoj de la vivo.

Vi eraras, dirante ke mia edzo havas helpon en sia laboro. Tute ne !! + pro la samaj kaŭzoj kiel vi. Li ĉiam, ĉiam maŝinskribas – k.k.foje¹ 30 leterojn po tago. Estus necese havi tro da iniciativo en lia profesio por preni sekretarion kiu verkis si² mem la leterojn.

Mia edzo estas terure, malagrabla okupita + pro tio, vintre, kiam li ne povas "tenisi aŭ golfi", li estas preskaŭ malsana, malĝoja + sen energio. Tio estas la tre granda ĉagreno de mia vivo. Li produktas laboron de 5 aŭ 6 homoj, li sola. Lia nura helpo estas la mia kiu skribas kovertojn de ĉiu aktaro + enskribas la registlibrojn. Tiu lasta estas tre laciga, iom komplikata.

Plie, ni havas junulon kiu enirigas la klientojn + malfermas la pordegon + faras la komisionojn k.t.p. + li faras la repertuaron de la leteroj kiuj estas ĉiuj kopiitaj. Depost la milito Lucien tute ne estas sama kiel antaŭe pri energio + sano.

Mi volis iri saluti vian Prez. Masaryk okaze de lia trapaso tie ĉi + malsprita ĵurnalo erarigis min pri la dato + mi nature ne povis iri. Oni faris belajn festojn por li + mi esperas ke li alportos ĉe vin belan rememorojn de Francujo.

Afabla vi estas dirante ke mi interese skribas – mi ĉiam timas, ke, pro tro granda interrompo de leteroj, mi ne povos trovi taŭgajn temojn indaj vin interesi.

La lasta via multe plaĉas al mi – sed kio signifas S.N.D., en la angulo? Tio pensigas min al konataj leteroj por mi: S.D.N. (Société des Nations).

Grandan dankon por interesaj P.M. Kio signifas : "Doplatit" sur kelkaj ? Vi estas tre afabla sendi ilin al mi.

Pro via Eveto, mi jam diris kiel mi simpatias + mi komprenas vian korestantan (ĉiaman) ĉagrenon. Poste, vi forgesos tiujn 6 malbonajn monatojn, kiam ŝi de nove kuros. Estas strange la granda loko kiun malgranda infaneto povas okupi en gepatrajn korojn, ĉu ne ?

Pri la 16^a en Wien, mi fortege esperas iri + esperas ke nenio malhelpu nin. Tie, mi esperas renkonti du korespondantojn miajn kiujn mi neniam vidis. Unu, S^{ro} Guerra, el Meksikujo kiu estas ĉiam fidela de 1918 + D^{ro} Broder de Varsovio. En Wien iros multaj konatuloj miaj + unue estas D^{ro} Ŝos. Ĉu vi memoras lin sur la balkono, la vesperon kiam oni ludas la teatraĵon – ankaŭ ĉe la urbdomo dum la vizito kiam urba konsilantino parolis li oferis sian seĝon al mi, antaŭ nia promenado, en ĝardeno, sur tiu altaĵo, aliflanke de la Moldava. Mi esperas ke la plimulto de la familio Zamenhof ankaŭ ĉeestos – eble S^{ro} Legrand ankaŭ. Li ne plu skribas de

¹ Ĉu "kelkfoje" ?

² Marĝena noto de Alice: Ĉu estas si aŭ li ?

longa tempe. La lasta skribaĵo lia estis versaĵoj pri vi + kunvenoj viaj en Praha.

Dankon por via P.K. pri sklavoj. Efektive, 1790 multe ŝanĝis la francan popolon.

Vetero estas milda, mildega + mi ne eklumigis la hejtaparaton ankaŭ – nur ligna fajro je vespere.

Ĉu la "Libera Penso" parolis kontraŭ Jeanne d'Arc? Mi supozas ke jes. Kia stranga temo por Ĉekoj! Kio estas nacia demokratio? Ĉe ni ne ekzistas juste same. Eble vi estos urbestro iam. Ĉu vi ŝatus? Mi ĉiam malhelpis mian edzon politiki. Li ŝatus multe – sed li neniam havus tempon + estus ankoraŭ pli laca. Kiom da foje delegitaroj petegis de li esti iu – sed ĉiam mi konsilis al li, ne.

Via skribaĵo tute ne enuas min + tion vi bone scias. Via lasta letero estis via 28^a en 26 monatoj – vi do vidas ke mi ne devas plendiĝi. Nun, adiaŭo, + grandan dankon por via afabla letero + ĝia enhavo. Tute same + sincere

Alice Sergeant